

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro A. BESSIERE 28, rue C. Saint-Saëns 76000 ROUEN
Sekr: F-ino G. PREUX 55/3 Terrasse Rue du 11 novembre 59290 WASQUEHAL
Kasisto: S-ro G. VILLENEUVÉ 14, rue du Clair de Lune 91530 SAINT-CHERON
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon 59800 LILLE
Paranto IKUE: S-ro M. COLLEU 95, rue Victor Hugo 80440 BOVES

C.C.P.: Association Catholique Française pour l' Esperanto 2 324 93 N ROUEN.

==== la n°: 8 F. Abono: 30 F. Kotizo: 10 F. Sume: 40 F. ====

==== N° 188 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====

*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== MARTO 1996 ====

N.B. La materialo por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent nepre antaŭ la
5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

LE MOT DU PRESIDENT

Il arrive aux plus grande journaux de commettre des erreurs et de publier ensuite des "errata". Cette mésaventure vient d' arriver à notre bulletin en ce qui concerne la date de notre prochaine assemblée générale. Elle n' aura lieu ni le 5 ni le 12 mai 1996, mais le samedi 4 mai 1996 à 14 h au couvent des Dominicains 20, rue des Tanneries 75013 PARIS.

Tout en priant nos lecteurs de nous excuser pour les informations erronées du bulletin de décembre 1995, j' invite tous nos membres qui le pourront, notamment ceux qui résident dans la région parisienne, à venir nombreux à cette assemblée générale.

A cette occasion, il sera procédé à l' élection de quatre membres de notre Comité Directeur. Si l' un des candidats sollicite le renouvellement de son mandat, les trois autres sont nouveaux, mais pleins de bonne volonté et d' ardeur. Je les recommande volontiers à vos suffrages et espère que vous serez nombreux à voter pour eux.

Notre association procède peu à peu à son renouvellement.

La rédaction et l' impression du bulletin, jusqu' alors effectués par Mme Vincent et Frère Marmou, dont on ne soulignera jamais assez le dévouement et l' exactitude, seront bientôt améliorées. Si tout va bien, un nouveau bulletin verra le jour dans quelques mois. Confié à un nouveau rédacteur, il sera plus moderne dans sa présentation et d' un format plus pratique. Nul doute qu' il constituera un progrès et renforcera, chaque trimestre, le lien existant entre nos membres dispersés dans la France entière.

LA BILETO DE LA PREZIDANTO

Kalkfoje, la plej prestiĝaj ĵurnaloj eraras, kaj poste publikigas "errata". Tio ĵus okazis en nia bulteno rilate al la dato de nia ĝenerala kunveno. Ĝi okazos nek la 5-an nek la 12-an de majo 1996, sed sabaton, la 4-an de majo 1996, je la 14.00, en la dominikana monaĝejo 20, rue des Tanneries 75013 PARIS (metro-stacio Glacière).

Petanta senkulpigon de niaj geĝegantoj pro la eraraj informoj en la decembra bulteno, mi invitas ĉiujn anojn, kiuj havas la eblon, ĉefe la loĝantojn en la pariza regiono, partopreni tiun ĝeneralan kunvenon.

Tiam, oni voĉdonos por kvar anoj de nia komitato. Dum unu rekandidatiĝas, la tri ceteraj estas novaj, sed plenaj je bonvolo kaj entuziasmo. Mi volonte rekomendas ilin al vi, kaj esperas, ke multaj voĉdonos por ili.

Iom post iom, nia asocio renoviĝas. La redaktado kaj presado de la bulteno, ĝis nun faritaj de S-ino Vincent kaj Frato Marmou, kies sindono kaj akurateco estas substrekendaj, baldaŭ pliboniĝos. Se ĉio iras glate, nova bulteno naskiĝos post kelkaj monatoj. Nova redaktoro modernigos ĝian aspekton kaj uzos pli praktikan formaton. Ĝi certe montros progreson kaj, ĉiutrimestre, plifortigos la ligon ekzistantan inter niaj anoj disaj tra la tuta Francujo.

A. B.

XX

PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO (24-an de januaro 1996)

Ĉeestis: F-to Marmou, S-ino Vincent, S-roj Bessière, Colas, Collet, Despiney, Lafargue kaj Villeneuve.

Petis senkulpigon: P-ro Bourdon kaj F-ino Preux.

Observis: S-ino Lafargue kaj F-ino A.M. Chaney.

La komitato findecidis pri la dato de la venonta ĝenerala kunveno: sabaton 4-an de majo 1996 en la monaĝejo S-ta Jakobo 20, rue des Tanneries je la 14.00. La voĉdonilo kuŝas en la bulteno.

La prezidanto informis, ke, post 9-jara deĵorado, li ne petos renovigon de sia ofico venontjare. Li transdonos ĝin al alia persono.

La kasisto prezentis la finanĉan raporton kaj donis klarigojn pri la kasostato, kiu estas kontentiga.

La komitato decidis aĉeti ekzempleron de la meslibro kaj legaĵaro, kiuj estos propraj de la asocio.

F-to Marmou konfirmis, ke la venontjara kongreso okazos en La Houssaye-en-Brie de la 23-a ĝis la 27-a de majo 1997. Li donos pliajn detalojn okaze de la ĝenerala kunveno.

S-ro Basso sin proponis kiel nova redaktoro; la komitato danke akceptis tiun proponon, kiu validos ekde septembro 1996.

Post la publikigo en "Le Pèlerin" de letero de la prezidanto, la asocio ricevis 5 informpetojn kaj varbis novajn membrojn.

La venonta komitatkunveno okazos en Paris la 4-an de majo 1996, tuj post la ĝenerala kunveno.

XX

LA KASISTO KOMUNIKAS ...

Novaj anoj 1996: 1. S-ino DIDIER (Vosges); 2. S-ino ZARCA (A-M); 3. S-to MAJOREL (Mali). Bonvenon al la genovuloj.

Bonfarantoj 1996: 2. S-ino CHEVERRY (M&L); 3. S-ro SANSON (Essonne); 4. S-ro LECOCCQ (I & L); 5. S-ino LAFARGUE (V. Marne);

Donacis monon: S-ro THIOLLIÈRE (Loire), S-ino GILLES (B-Rhin), S-ino CHIALVO (P-A) G-roj CUGNY (C. d'Or), S-to RUNPAOT (Finistère) kaj S-ro SANSON (Essonne).

Dankegon al ili pro ilia grava helpo al nia asocio.

LA KRISTANA ORIENTO (Fin)

Pri la loko de la restado kaj Ĉieliro de la Virgulino, necesas ankaŭ menci la tradicion konservitan de la grekaj kristanoj ĉirkaŭ Efeso ĝis ilia forigo antaŭvidita en la traktato de Lausanne (1923).

Tiuj grekoj, instalitaj en la regiono verŝajne de tre longe, loĝis ĉefe en la vilaĝo Kirkindjé (nomata Sirince de post ilia foriro), je 18 km de Panagia Kapulu.

Fidelaj je tre malnova kutimo, tiuj kristanoj ĉiujare pilgrimis al Panagia Kapulu la 16-an de aŭgusto por tie festi la Endormigon de la S-ta Virgulino. Informite pri tiu kutimo, M-ro Timoni, akaze de sia vizito al Panagia Kapulu, petas, ke la lazaristoj iru al Kirkindjé por enketi pri la ekzaktaj kialoj de la pilgrimo. La esploro daŭris de la 2-a ĝis la 14-a de decembro 1892; sekvis protokolo subskribita de la vilaĝestro, S-ro Constantinidhis, advokato en la Konak de Smirno, kaj grek-ortodoksulo.

El tiu dokumento reliefigas "ke post la krucumado de Nia Sinjoro Jesuo-Kristo en Jerusalemo, nia sankta Dipatrino estis sub la prizorgado de S-ta Johano. Kaj ili venis en Efeson..."

Pro sekureco, La Virgulino estus kaŝita unue ĉe la monto Bodrum, norde de la urbo. Oni nomis tiun lokon Kriphy Panagia, t.e. "la Tre Sankta Kaŝita".

La loka bizanca liturgio memorigis tiun epizodon de la vivo de la Virgulino en la tago de la Zoodaku Pyghis (vivofonto), t. e. en la vendredo post Pasko.

Ĉar ankaŭ la restado ĉe la monto Bodrum estis riska, S-ta Johano estus instalinta la Virgulinon je unu marŝoharo de tiu loĝejo, sude, en loko, nun same kiel tiam, priplantita per popoloj, pro tio nomata Kavakli Panagia. Fine, Johano estus elektinta pli sekuran restadejon sur la norda flanko de la monto de la Najtingalo en Panagia Kapulu; jen ni ree alvenas sur la lokon, kien jam direktis nin la vizioj de Katarina Emmerich.

Kvankam tiu koincido estas miriga, ĝi tamen ne ebligas, ke oni konsideru la venon de Maria en Efeson, kaj eĉ malpli ŝian restadon en Panagia Kapulu kiel absolute kredinda.

Tamen, tiu veno en Efeson ne dubigis religiajn eminentulojn, kiuj iam havis ĉefan rolon en la Eklezio. En la modernaj tempoj, pluraj papoj emis dividi tiun opinionon private. La unua inter ili, laŭ nia scio, estis Benedikto XIV-a, la plej granda papo en la XVIII-a jc.

Malpli certa, Leono XIII-a, al kiu oni egmanigis la dosieron pri Panagia Kapulu, tamen reskribigis en la Diario Romano la jenan informon antaŭe forviŝitan: "...laŭ la plej verŝajna opinio, Maria mortis en Efeso". Sekve li forprenis la indulgencojn ligitajn kun la pilgrimo al la supozita tombo de la Virgulino en Jerusalemo, per papa letero de la 18-a de aprilo 1896. Pio X-a samopinias, imitata de siaj kvar posteuloj. Paŭlo VI-a kaj Johano-Paŭlo II-a iris pli malpraktikem. Ili ambaŭ pilgrimis al Panagia Kapulu, respektive la 26-an de julio 1967 kaj la 30-an de novembro 1979.

Ekde 1950, homamasoj antaŭis ilin, kaj de tiam la fluo de la pilgrimantoj daŭre kreskas.

El "Oeuvre d' Orient n° 684-685 " 20, rue du Regard
75006 PARIS (trad. J. V.)

LA RIDA ANGULO

Junulo malsukcesis sian abiturientan ekzamenon. Li telegrafas al sia fratino: "Mi fiaskis; preparu paĉjon je tio".

Ŝi respondas: "Paĉjo preparita; cin prepariĝu!"

Du virinoj renkontiĝas. - Kiel laca vi aspektas! Ĉu vi estas malsana? - Terure. Kulpas mia edzo! - Ĉu vere? - Jas: li suferas pro prostato kaj tion transdonis al mi!

LA PLORA ANGULO

Forlasis niajn vicojn Roland JOSSINET, 89-jara. Li estis tre fidela membro, afabla kaj klera. Li restas viva en niaj memoroj. Ni preĝu por li!

RENOVIGO DE 1/3 DE LA KOMITATO

Instrukcioj por la voĉdonado:

1. Respondu la demandojn 1 kaj 2 sur la voĉdonilo ĉi sube.
2. Enmetu la voĉdonilon (eventuale ankaŭ la rajtigilon) en koverton, SEN INDIKO.
3. Enŝovu ĉi tiun en alian, kiun vi sendu al la sekretario, F-ino Preux, antaŭ la 15-a de aprilo 1996. Dorso de tiu dua koverto, skribu vian nomon.

N.B. Ne sendu ion plian en ĉi tiu koverto, kiun oni malfermos nur en Paris la 4-an de majo 1996.

RAJTIGILO

La subskribinta (nomo kaj vokno) ne povas partopreni la ĝeneralan kunvenon en Paris kaj rajtigas reprezenti min kaj preni mianome ĉiujn decidojn por la bono de F.K.E.A.

Antaŭ la subskribo, skribu mane "Bon pour pouvoir"

Dato kaj subskribo:

VOĈDONILO

sendota al F-ino Preux nepre antaŭ la 15-a de aprilo 1996.

1. Ĉu vi aprobas la agadraporton? (p. 4) JES NE SINDETENO (1)
2. Ĉu vi aprobas la finanĉan raporton? (p. 4) JES NE SINDETENO (1)
3. Renovigo de 1/3 de la komitato. Estas 4 kandidatoj por 4 postenoj. Vi rajtas forstreki aŭ aldoni nomojn, sed devas esti maksimume 4 nomoj entute.

F-ino CHANEY Anne-Marie

S-ro LAFARGUE Henri

S-ino LAFARGUE Sylviane

F-ino MICHEL Solange

(1) Forstreku la senutilaĵojn.

N.B. ĈU VI ATENTE LEGIS LA INSTRUKCIOJN POR LA VOĈDONADO? SE NE, RELEGU!

VI REVENAS PRENI NIN

Sinjoro, Vi ne estas Dio juĝanto,	Vi volas, ke ni estu pardonitaj.
Vi ne estas Dio venĝema,	Benata Vi estu, ĉar Vi volas, ke ni estu amo
sed Vi estas Dio senlime amanta,	kaj aŭskulto, tenoro kaj konsolo.
kiu akceptas nin tiaj, kiaj ni estas.	Vi volas, ke ni dividu,
Vi neniam forkasas la rilaton,	Vi volas, ke ni estu helpo kaj etendita mano
sed Vi konstante revenas preni nin.	Benata Vi estu, ĉar Vi volas, ke ni disradiu
Benata Vi estu, ĉar Vi volas, ke ni pardonu,	pacon kaj ĝojon.

Por ĉio, Sinjoro, Via nomo estu glorata.

François ROLAND

KOTIZTABELO 1996

I.K.U.E. kun "Espero Katolika" 140 F
 Peranto: S-ro M. COLLEU p.ĉ.k. LILLE 10 621 81 P.

A.C.F.E. kun "Franca Katolika Esperantisto" - unuopulo	40 F
geedza paro	50 F
infano ĝis 16-jara, pastro, religiul(in)o	20 F
bonfaranto	200 F

U.F.E. kun "Revue Française" kaj "E° Actualités" 280 F
 U.E.A. kun "Esperanto" kaj Jarlibro 300 F

Association Catholique Française pour l' Esperanto, c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

• ENHAVO

- | | |
|--------------------------------|----------------------------|
| 1. Le mot du président | 4. Agadraporto |
| 2. La bileto de la prezidanto | Financa raporto |
| Protokolo de la komitatkunveno | 5. Rajtigilo kaj voĉdonilo |
| La kasisto komunikas ... | 6. Vi revenas preni nin |
| 3. La kristana Oriento | Kotiztabelo |

Dépôt légal: 1er trimestre 1996!! Polycopié par l' A.C.F.E. (enregistrée le 6 mai
 !! 1977 à la sous-préfecture de Saumur sous le
 C.P.P.A.P. n° 62 532. !! n° 2 523 bis, J.O. 23/05/1977)
 Directeur: Albert BESSIERE !! au Prieuré St-Martin.
 Directeur-délégué: !! 77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
 René-JeanMARMOU !! FRANCE
